# *Kuba prezidento bonvenigas la venezuelan gvidanton Diosdado Cabello*



**Disodado Cabello alvenis al Kubo**

Havano, 8 a?g (RHK) Miguel Díaz-Canel, unua sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo kaj prezidento de la Respubliko, bonvenigis Diosdado Cabello, unua vicprezidanto de la Unui?inta Socialista Partio de Venezuelo (PSUV).

Kara frato, bonvenon al Kubo, lando kie vi estas amata kaj admirata, deklaris la kuba ?tatestro en Tvitero.

Díaz-Canel certigis, ke ?i tiu vizito permesos pli proksimajn rilatojn inter la PSUV kaj la Komunista Partio de Kubo.

?iam kune la patrujoj de Bolívar kaj Martí, Chávez kaj Fidel, aldonis la prezidanto.

La unua vicprezidanto alvenis al la insulo ?i-lunde, tra la Internacia Flughaveno Antonio Maceo en Santiago de Kubo, oriente de la insulo ?e la kapo de altnivela venezuela delegacio formita de kvin aliaj vicprezidantoj kaj aliaj membroj de la PSUV.

Kadre de la komenca tago de sia laborprogramo, la partia reprezentanto oma?is la fondpatrojn de la Nacio ?e la Tombejo Santa Ifigenia kaj vizitis la Historian Muzeon 26 de Julio.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/330783-kuba-prezidento-bonvenigas-la-venezuelan-gvidanton-diosdado-cabello

**Radio Habana Cuba**